

また、サハリンでアイヌタイムズを購入してもらうために、何人かに配布した<<北海道の先住民族の雑誌「アイヌタイムズ」とエスペラント(ロシア語文)>>をエスペラントで要約したので、次のとおり掲載します。

<http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/sahxaleno/sahxaleno.htm>

Resumo de <La gazeto de Hokkajdaj indiĝenoj "AinuTimes" kaj Esperanto>

En la gubernio Hokkajdo de Japanio troviĝas la indiĝenoj Aino kiel la indiĝenoj Nivĥo, kiu klopodas heredi siajn lingvon kaj kulturon, en la gubernio Saĥaleno.

Mi helpas publikigon de ain-lingva gazeto krom Esperanto.

En 1996 la ainaj volontuloj fondis la klubon 'Ainugo-Pen-Kurabu' kaj ekde 1997 ĝi publikigas regule la gazeton 'AinuTimes' faritan nur ain-lingve. Mi aliĝis al la klubo en 1999.

La klubo publikigas la gazeton sendepende por eviti la registaran troan intervenon. Tial ĝi estas administrata nur per la membrokotizo kaj la abonpago. La gazeto estas publikigata trifoje aŭ kvarfoje ĉiujare, kaj pli ol 60 n-roj estas eldonitaj ĝis nun.

La kluba regularo tekstas, "Protekti liberecon pri parolo, esprimo kaj eldono, kaj disvastigi esprimon kaj publikigon en la aina lingvo japanen kaj tut-monden". Kaj ni esprimas diversajn aferojn de moderna vivo en la eldonaĵo. S-ro KAJANO Ŝiroo, unu el ainaj fondintoj, diris jene:

"En la tuta mondo homoj vivas kun diversaj lingvoj, gentoj, religioj kaj nacioj. Mi deziras, ke oni ĝenerale garantiu al ĉiu gento la rajtojn pri uzado de ĉiu lingvo sen dependo de politiko de la registaro, al kiu la gento apartenas."

En n-ro 11 troviĝas mia ain-lingva artikolo pri Esperanto.

• • • "Esuperanto" itak anak usa oka mosir un utar, ukoyki somo ki no ukoysoytak kunine, 1887 pa ta "Poorando" mosir or un "Zamenhohu" sekor re an kur asinno kar itak ne wa usa oka mosir un utar uturano eywanke p ne ruwe ne. • • •

"En la jaro 1887, en la lando Pollando, persono, kies nomo estas "Zamenhof", nove faris la lingvon Esperanton, por ke oni interparoladu sen konflikti, kaj la lingvo Esperanto estas lingvo, kiun personoj en tuta mondo uzas." (En septembro de 1999, eldono de 'Ainugo-Pen-Kurabu')

La monda Esperanta movado adoptas la Manifeston de Prago kaj klarigas la gravecon de 'lingvaj rajtoj' kaj 'lingva diverseco'. Mi ankaŭ tradukis la Manifeston en ainan lingvon.

Ni, popoloj de Saĥaleno kaj Hokkajdo, estu amikoj kiuj transiras lingvajn barojn kaj respektas reciprokajn lingvojn.

(YOKOYAMA Hiroyuki)